

Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Teknika fakultato,
NIŠ, Jugoslavio

Lingva kontrolanto Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I,
BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2
dol. = 25 N. Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkozito 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Dobrinjska 12,
Beograd (= jugoslovenska podružnica Međunarodnog nauĉnog društva
esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,
(Tehniĉki fakultet, Niš)

Stampano u Grafiĉkom preduzeću «STAMPA», Sarajevo: za štampariju
Simo Bunĉić.

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 19
N-ro 2 (70)
20. 5. 1967.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 2500 din

Enhavo:

- F. G. Blasquez: Terminologiaj demandoj en sintakso
R. Harry: Relativaj oftecoj de lingvaj elementoj en esperanto
B. V. Tokarev: Genetikaj ligoj inter sciencoj
B. Popović: La lasta renaskiĝo de astronomio

001.4:415.6

TERMINOLOGIAJ DEMANDOJ EN SINTAKSO

(Felix Garcia Blazquez, Caracas, Venezuelo)

En ĉtiu artikolo estas proponata nomenklaturaro por la Ĝenerala Sintakso, celante precipe al tiu de la okcidentaj lingvoj, kvankam kompreneble la diskutado ankaŭ povas taŭgi por la esperanta.

Ĉar logike ne povas esti difinitaj ĉiuj terminoj, kelkaj estos bazaj. Unu el ili, nediskuteble estas «vorto», ĉar ĝis hodiaŭ ne aperis iu difino libera je mankoj. Estas probable kaj preskaŭ nepre ke ekzistu aliaj pli.

Kiel ni vidas tra la ĉemetita tabelo, troviĝas malakordoj por nomado de la konceptoj, ne nur en malsamaj lingvoj, sed ankaŭ inter diversaj aŭtoroj de unu sama lingvo.

Cele faciligi komprenon de la posta diskuto oni eksponas jene difinojn kaj prinomojn provizorajn kiuj nin kondukos finfine ĝis pli perfektigitaj difinoj kaj klasifoj.

Klarigoj pri nomenklaturprovizora

Oracio

La koncepton »kunaĵo da vortoj esprimanta kompletan sencon« mi nomas oracio (L: oratio — H: oración), laŭ Plena Vortaro propozicio aŭ frazo. Ĉi tiu termino oracio rezultis preferita inter »propozicio«, »frazo«, »klaŭzo« kaj »sentenco« pro jenaj pravigoj:

Unue, malgraŭ ĝia pligranda internacieco, ne konvenas uzi »propozicion« pro ĝia signifo en Logiko, subjekto tiel intime ligita al la Lingvoscienco. Oni devas priatenti do, ke ne ĉiu propozicio estas oracio; ekz-e la jenaj oracioj:

Venu ĉi tien. (1) Kioma horo estas? (2)
ne estas propozicioj. Kontraŭe ja estas propozicio

Via patro laboras en la urbo. (3)
kiu enhavas aserton pri kiu oni povas determini ĉu ĝi estas vera aŭ malvera.

Kiom la aliaj transliterigoj: frazo, klaŭzo kaj sentenco, ili havas malkongruajn signifojn en diversaj lingvoj, kaj eĉ foje ene de sama lingvo.

Ĝenerale estas akordo pri tio nomi **simplo oracio** (krom la afero pri la termino »oracio« mem) tiun kiu havas nur unu verbon en finita formo, t. e. kun iu el la finaĵoj -as, -is, -os, -us aŭ -u. Sed la oracio havanta pli ol unu tian verbon estas nomata de kelkaj gramatikistoj **kunmetita oracio**, dum aliaj nomas ĝin **kompleksa oracio**. Aliaj iom pli avertitaj, parolas en tiuj kazoj pri kunmetitaj kaj kompleksaj periodoj. Vidinte la konfuzon inter oracio kaj periodo ni devas do, ataki la problemon konsiderante samtempe ĉi tiujn du konceptojn.

Periodo

Per periodo mi komprenas »Kunaĵo da oracioj havanta sencan unuecon (kompletan sencon) kaj trovita inter du sinsekvaj punktoj de paragrafo«. Pli ol difino, ĉi tiu estas delimitigo de nocio (limdifino), eble malmulte akademieca, sed utila por rekoni periodon, sen konfuzi ĝin kun oracio.

Oni devas preferi la terminon »periodo« pro ĝia pligranda internacieco fronte al »sentenco«. Plie pri »klaŭzo«, la angla ekvivalento (clause) kaj la hispana (cláusula) tre diverĝas en signifo (vidu tabelon). Kvankam »frazo« ŝajnas pli internacia ol periodo en ĝia partikulara signifo, ne estas tia, ĉar praktike ĝi ampleksas la tri lingvajn elementojn studatajn en ĉi tiu artikolo. En la Sintakso la termino »frazo« devus signifi nenion, estante preferinda lasi al ĝi nur retorikan, stilistikan signifon (PV. 2)

Ĉiu periodo povas esti kunmetita de pluraj oracioj, ligitaj inter ili diversmaniere kaj per diversaj iloj; aŭ ankaŭ povas esti konstituita de unu sola oracio. En ĉi tiu lasta kazo ni havas **simplan periodon** (ankaŭ provizora nomo, sed la plej uzata hodiaŭe). Se la periodo estas formita de pluraj oracioj, la nomo de ĉi tiu tipo dependas de tio kiel estas ligitaj ili. Ĉar ĉi tio estas disputa punkto, decas uzi la neŭtralan nomon **nesimpla periodo** por grupigi ĉi tiujn tipojn.

Lokucio

Iu tipo de grupo da vortoj funkcianta kiel oracia elemento estas konsiderota tuj; kaj kvankam ĝi ne partoprenas aktive en la demando, konvenas doni al ĝi Esperantan nomon. Ĝi diferencas de subordigita oracio ĉar ĝi ne havas finitforman verbon.

Ĉar ĝi plenumas oracian funkcion, kutime oni ĝin dividas laŭ adjektivaj, adverbaj k. c.

adjektiva domo **el ligno** (4)

adverba li tuŝis **per la lango** (5)

prepozicia **fronte al la lernejo** (6)

»Lokucio« estas la plej internacia vorto por reprodukti la cititan koncepton, kiel oni povas konstati en la tabelo. La termino ĝenerale havas du sencojn en diversaj lingvoj: unu el ili strikte gramatika, kiu en Esperanto ne havas ankoraŭ ekvivalenton, kaj la alia retorika. La Plena Gramatiko uzas foje **prepozitiva**, por prepozicia lokucio, alfoje **prepoziciaĵo** por lokucio konstruita el prepozicio(j), kaj **adjekto** por aliaj tipoj de lokucioj, sed ĝi tute ne havas ĝeneralan terminon por la prikonsiderita koncepto. En la retorika signifo, respondas pli-malpli al la Esperanta »esprimo«.

Diskutado

La citita difino pri oracio, kompreneble ne estas tro perfekta: sed oni ĝin akceptas preskaŭ tutmonde, pro kio ĝi bone taŭgas por nin interkomprenigi.

En gramatikaj lernolibroj post tiu difino ofte oni ĝin klarigas dirante ke la oracio estas konstituita de subjekto, verbo kaj komplementoj (kelkaj inkluzas komplementon kaj verbon en predikato) kiuj funkcias kiel sintaksaj elementoj de la oracio.

Rezultas relative facila tio doni ekzemplojn pri simplaj oracioj sen pro tio kaŭzi malakordon. La oracioj: »Leono estas besto« (7) kaj »La frato de Johano havas tre elegantan ĉapelon« (8) estas de ĉiuj rekonitaj kiel simplaj.

KOMPARA TABELO PRI

Proponita		EKZIS	
		ANGLA	ESPERANTA
LOKUCIO		locution phrase	
ORACIO	simpla	(1) Simple sentence	prop. primitiva (2) komplemen-tita
	kompleksa	complex sentence	kompleksa frazo kun subordita propozicio
		principal clause	ĉef-propozicio
	subordigita	subordinate clause	subpropozicio
	sendependa	principal clause	memstara propozicio
PERIODO	simpla	(1) simple sentence	simpla frazo
	kunmetita	compound sentence	kompleksa frazo kun kunordita propozicio

SINTAKSA NOMENKLATURO

TANTA

	FRANCA	HISPANA	ITALA
	locution	locucion frase modo	locuzione
(3)		Oración simple	Semplice (6)
Phrase		Frase Oración compuesta (5)	proposizione composta complessa (7)
	proposition principale	Oración principal	proposizione principale (8)
	prop. subordinée prop. indépendante	Proposición Oración subordinada oración independiente	prop. subordinata prop. principale
(4)		cláusula simple	simple
Phrase		Periodo cláusula compuesta	Periodo complesso composto

Estas grava afero distingi inter oracio de la plej simpla konstituo (7) en kiu ties elementoj estas nuraj vortoj, kaj la alia tipo en kiu la elementoj estas grupo da vortoj. Povas okazi en iu subtipo de la dua, ke unu el tiaj grupoj funkcii siavice kiel oracio. Ekz.:

Petro diris ke **vi estis malsana** (9)

kie la substrekita parto estas objekto de la verbo »diris«.

Malgraŭ ke ĉi tiu ekzemplo enhavas du verbojn en finita formo, ĝi entute estas unu oracio, kvankam ja kompleksa. Ĝi havas sian subjekton (ĉefan) tre bone determinitan, la ĉefa verbo ankaŭ bone determinita. (»diris«) kaj egale la ĉefa objekto, kiu ne estas vorto sed oracio. Pri la partikulo »ke« ne valoras fari nun ian analizon.

El la vidpunkto de rilato kun aliaj oracioj, ni trovas subordigitajn kaj sendependajn oraciojn.

La subordigita oracio dependas de alia oracio, aŭ pli bone de parto de oracio (»vi estis malsana« en la ekzemplo 9).

La sendependa ne dependas de alia oracio, kaj se ĝi staras akompanita, ĝi havas la saman rangon kiel la akompananta oracio.

Ne ekzistas ankaŭ ia malfacileco kompreni kio estas simpla periodo. Ekzemplo de ĉi tiu lasta:

»Oni devas preferi la terminon 'periodo' pro ĝia pligranda internacieco fronte al 'sentenco'« (en 10-a alineo de ĉi tiu artikolo) (10).

Sed la malakordoj aperas kiam ni traktos pri la nesimplaj periodoj (V. tabelon).

La nesimplaj periodoj diferencigas inter si per la grado de ligiteco ekzistanta inter iliaj konsistigantaj oracioj. Ĉi tiu ligo povas ekiri de la nura apudmeto, ĝis unuiĝo aŭ fandiĝo tiel intima ke unu el la oracioj plenumas sintaksan funkcion esencan al la alia, kaj ĉi tiu lasta kutime nomiĝas »ĉefa oracio«. Tamen, por ĉi tiu etapo de diskuto eblas subdividi kun ĝenerala akordo la nesimplan periodon en **periodo de »ĉefa oracio« plus subordigita (j) oracio (j) kaj periodo de kunordigitaj oracioj**. Ekz.

Johano diris ke li ne venos. (11)

Vi havas tri dolarojn kaj mi (havas) dek frankojn. (12)

La unua tipo (11) konsistas el unu oracio, iu el kies elementoj estas alia oracio »kompleta« ligita aŭ enkondukita per partikulo. En ĉi tia periodo persistas unu unika kerno (ĉefa verbo).

La dua tipo (12) estas konstituita baze kaj ĝenerale per pluraj oracioj, kie ĉiu el ili havas egalan gravecon rilate al la aliaj; t. e. en ĉi tiu kazo ne ekzistas polariga elemento kiu grupigas ĉiujn aliajn kiel okazas en (11).

Kelkuij nomas la ekzemplon (11) **kompleksa periodo**, sed ĉi tiu prinomo estas nekonsistenta tial ke tia komplekseco estas kriterio pli bone por klasifi oraciojn ol por klasifi periodojn. Plie ne estas nepre ke unu kompleksa oracio konstituas per si mem periodon. Ni vidu:

Johano diris ke li ne venos, sed tio ne estas malhelpo por ke ni komencu la kunsidon. (13)

Kie la substrekita parto estas kompleksa oracio, sed nur parto de la tuta periodo.

Restus do, kiel unika reprezentanto de la klaso periodo nesimpla, la kunmetita periodo, responda al la ekzemplo (12). Sed oni devas fari etan klarigon.

Kelkaj aŭtoroj nomas la ekzemplon (12) **kunmetita oracio**. Ĉi tio ne tute kongruas kun la klasika koncepto pri oracio, kiu koncepto temas pri unu subjekto, unu verbo... sed ne pri pluraj (oni devas subkompreni pli ĝeneralece: ĉefa subjekto, ĉefa verbo k. c.). Plie kiel ni antaŭe vidis, la kunaĵo de pluraj oracioj pli bone respondas al la koncepto de periodo. Do la (12) ne estas oracio.

Ni aldonu ke ĝenerale oni konsideras la kunordigitajn oraciojn kiel specialan kazon de sendependaj oracioj. Siavice la kunordigitaj oracioj subdividiĝas je: per konjunkcioj, kaj per apudmeto.

Konkludoj

Atente al tio antaŭe dirita ni povas establi la jenajn definitivajn difinojn pri diversaj specoj de oracioj kaj periodoj.

Simpla oracio: tiu kiu havas unu solan verbon en finita formo.

Kompleksa oracio: tiu kiu almenaŭ havas kiel unu el siaj elementoj, unu simplan oracion.

Sendependa oracio: Tiu kiu per si mem reprezentas »kompletan sencon«.

Subordigita oracio: tiu kiu funkcias kiel elemento de alia oracio. (Ĝenerale ĝi estas ligita per partikulo al iu elemento de tiu oracio kompleksa).

Noto: Ne ekzistas subordiganta aŭ ĉefa oracio, ĉar tio kio restas el oracio kiam oni deprenas de ĝi ekzemple la objekton, jam ne estas oracio. »Petro diris« en la ekzemplo (9) ne estas oracio, ĉar ĝi ne havas kompletan sencon, mankas al ĝi la objekto.

La kompleksajn oraciojn oni povus klasifi laŭ ilia grado de komplekseco: la ekzemplo (9) estas unuagrade kompleksa; jen ekzemplo de oracio kompleksa duagrade:

Ŝia kuzo aŭdis ke vi diris ke morgaŭ ni iros al la balo. (14)

La difino de simpla periodo suferos ian etan modifon kaŭze de la ĝeneraligo de la koncepto pri oracio.

Simpla periodo: la konstituita per unu sola oracio, de ajna grado de komplekseco.

Kunmetita periodo: la konstituitaj per pluraj oracioj sendependaj.

Kunordigitaj oracioj: sendependaj oracioj kiuj ligitaj inter si konstituas kunmetitan periodon.

BIBLIOGRAFIO KAJ NOTOJ AL LA TABELO

ANGLA: A Grammar of Modern English — Cyrill Miller.

New Collegiate Dictionary — Webster.

(1) Notu la du malsamajn konceptojn pri »sentence«.

»A simple sentence is a sentence that has only one finite verb.
Ex.: He made me forget all my troubles« (Miller)
ĉitie, sentence = oracio.

»Simple sentence consists of one independent clause« (Webster)
en ĉi tiu kazo sentence = periodo.

ESPERANTA: Plena Gramatiko de Esperanto (Kalocsay kaj Waringhien) Plena Vortaro de Esperanto.

(2) La terminoj enkrampigitaj entenas nian koncepton pri simpla oracio.

Nouveau Petit Larousse Illustré — Dictionnaire.

FRANCA: Grammaire Larousse du XX siecle.

(3) Ĉi tiu situo de la termino »phrase« baziĝas sur ties difino:
»Assemblage des mots présentant un sens complet«

(4) Situigo bazita je la klarigo de la »Grammaire«: »Il y a dans une phrase autant de propositions qu' il y a de verbes à un mode personnel exprimés ou sous-entendus«.

HISPANA: Gramática — Real Academia Española.

Diccionario — (sama aŭtoro)

(5) La »oración compuesta« koincidas kun la itala »proposizione composta« kaj kun la »kuntirita frazo« de PG.

ITALA: Novissima Grammatica Italiana — F. Pallazzi.

(6) »Proposizione semplice« identas kun »propozicio primitiva« (PG).

(7) »Proposizione complessa« identas kun »propozicio komplementita« (PG).

(8) »Proposizione principale« entenas ankaŭ »kunordigitajn propoziciojn« (PG).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 2 (1967)

41:408.92

RELATIVAJ OFTECOJ DE LINGVAJ ELEMENTOJ EN ESPERANTO

(Ralph Harry, Bruselo, Belgio)*

En Scienca Revuo Vol. 10-a paĝoj 67—72 Victor Sadler raportis pri sia studado de relativaj oftecoj de kelkaj lingvaj elementoj en Esperanto, inter ili la relativa ofteco de la Esperantaj fonemoj.

Mi ripetis tiun studon, laŭ la metodoj de Sadler. Mi prenis po 500 specimenojn el 6 prozaj tekstoj laŭhazarde prenitaj el diversaj fontoj, do entute 3000 specimenojn. Tiuj fontoj inkluzivis sciencajn (Scienca Revuo Vol. 9-a p. 3 kaj La Vivo de la Plantoj p. 65) fikciajn (Marta p. 143 kaj Inter Sudo kaj Nordo p. 89) beletrajn (Monda Kulturo Somero 1963, Noktoj sendormaj) kaj ĝeneralajn verkojn (Esenco kaj Estonteco, Zamenhof, Originala Verkaro p. 295) inter kiuj ne mankis ankaŭ Zamenhofaj.

Laŭ la Sadlera metodo mi nombris la 24 fonemojn kiuj konsistigas Esperanton. La diftongojn aj, ej, oj, uj, aŭ kaj eŭ mi analizis laŭ iliaj konsistigaj sonoj, ĉar ili ne estas semantike memstaraj, t. e. foneme distingendaj. La literon ŭ mi rigardis kiel u, c kiel ts, ĉ kiel tŝ, kaj ĝ kiel dj, ĉar en tio ne estas eblo de semantika konfuzo. Male la sonon j necesas distingi disde i, ĉar tiuj sonoj povas okazi en identa fonetika kunteksto, sed kun malsama signifo, ekzemple jama kaj iama.

Miaj rezultoj estas en la suba Tabelo en kiu mi montras kompare la rezultojn de Sadler, kaj la kunmetita statistiko eltirita el la sumo, t. e. el la 6,000 specimenoj.

Miaj rezultoj treege similas al tiuj de Sadler. Miaj rangoj por »n« kaj »o« estas 4 kaj 5 — tiuj de Sadler estas 5 kaj 4. Simile pri m kaj p, kiuj okupas la rangojn 15, kaj 14. La rangoj de f, ŝ, g, b, ĵ, kaj z iomete varias, sed niaj rezultoj kunindikas, ke tiuj literoj okupas la rangojn 17 ĝis 21 k. t. p.

* 5 ar. du Chili, Bruselo 5.